

Saluto de s-ro Walter Frankhauser al la forumo de la Esperanto-ekspozicio

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-807/260, 1979 marto 29 kaj 31

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-37/SRI-1979-37-B-5-260-807-1979-03-29-31-Claude-Gacond-Saluto-de-s-ro-Walter-Frankhauser-al-la-forumo-de-la-esperanto-ekspozicio.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ekde januaro, ĝis pasko la Svisa Nacia Biblioteko en Berno prezentas en la enireja koridoro tre gravan ekspozicion pri 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando'. Sub 40 paneloj klarigaj, vitrinoj proponas al la vizitantoj aŭtentajn dokumentojn, kiuj donas ideon pri la historio de interlingvistiko en Svislando kaj pri la aktuala disvolviĝo de esperanto.

Okaze de la malfermo de tiu ĉi ekspozicio komence de januaro, post komentariita vizito estis organizita en nia Svisa Radio Internacia, kies aktivecon ĝuste prezentas ekspozicipanelo, forumo, dum kiu la ekspozicivitintoj povis esprimi siajn impresojn kaj la organizintoj de la ekspozicio siajn ideojn. La forumon enkondukis nome de Svisa Radio Internacia s-ro Walter Frankhauser, la estro pri la publikaj rilatoj. Ĉar li mem ne parolas esperanton, aŭtomate sin prezentis lingva demando, kiu karakterizas la rilatojn inter la svisoj. En kiu lingvo sin esprimi? Kiel vi konstatos, la germanlingvanoj rezignis je la uzo de sia idiomo favore al la franca, en kiu sin esprimis s-ro Frankhauser nome de la radio. Ni disaŭdigas liajn vortojn kaj interpretas lin.

WF.- *Guten Tag meine Damen und Herren. Ich musste leider in Deutsche Sprache begrüßen. Ich bin des Esperanto nicht mächtig, hätte sehr gerne mal gelernt, aber eben, man tut so viel [...]. Wenn es einige unter Ihnen gibt die Deutsch nicht verstehen, werde ich dann gerne ein paar Worte auf Französisch sagen. Kann ich vielleicht, um mich selbe zu orientieren, wissen, wie viele französisch-sprachige unter Ihnen sind? Combien de personnes de langue française il y a parmi vous? ... Ah, je vois... Si je parlais en français, est-ce qu'il y aurait quelqu'un qui ne comprendrait pas ?*

Cl.- Vi devas tion ... demander en allemand.

WF.- *Ja. Entschuldigung. Wenn ich auf Französisch spreche, gibt es Leute unter Ihnen die nicht verstehen? ... Aha, ... alors, je pense, je fais cette petite introduction en langue française. Je vois que du monde ne comprend pas seulement l'espéranto, mais aussi le français. C'est bien !*

Cl.- Mi tradukas :

Bonan tagon gesinjoroj. Mi bedaŭrinde devas en la germana saluti vin. Mi ne regas esperanton. Mi estus ĝin volonte lerninta, oni multon celas, sed ne ĉion povas plenumi. Mi eble tion foje faros. Se kelkaj el vi ne komprenas la germanan, mi volonte diros kelkajn vortojn France. Mi ŝatus scii kiom da franclingvuloj estas inter vi. ... Ha, mi vidas, se mi parolas france, ĉu el vi iu ne komprenas? Se mi parolos france eble vi ĉiuj komprenos. Do, mi pensas, mi faros tiun enkonduketon franclingve.

- La direktoro aldonas :

Mi vidas ke ĉiuj komprenas ne nur esperanton, sed ankaŭ la francan.

WF.- *Alors, je vous souhaite le bienvenu ici au siège de Radio Suisse Internationale, et de la Télédiffusion. Radio Suisse International, qui était jusqu'il y a quelques mois seulement le Service suisse des ondes courtes, Svisa Kurtonda Radio, et maintenant radio...*

Cl.- Mi deziras al vi bonvenon en la sidejo de Svisa Radio Internacia kaj de la teledissendado. Svisa Radio Internacia, kiu ĝis kelkaj semajnoj estis nur la svisa kurtunda servo de Svisa Radio-Societo, estas nun Svisa Radio Internacia. Svisa Radio Internacia enkondukis programojn en esperanto jam ekde dekoj da jaroj. Programo, kiu verŝajne rondiris la mondon jam multfoje. Kiu kontribuis al la komunikado interhoma, al pli bona interpopola interkompreno, ĝuste helpe de esperanto. Estas vere ke ni komencis kun naciaj lingvoj kiel la franca, la germana, la itala, kaj ni sekvis kun fremdaj lingvoj, kiel la angla, hispana, portugala kaj fine la araba. Sed ni konstatis, ke ni ne povis elpreni esperanton, kiu eniris nian programon dum la unuaj jaroj 1940-aj. Kiam ni provis elpreni tiun ĉi lingvon esperanton, ni vidis ĉiujn protestojn el ĉiuj mondopartoj. Reagoj, kiuj devigis nin preskaŭ, konservi esperanton en niaj programoj, kaj tiel konfirmi ĝin, kiel gravan lingvon por interkomunikado. Estas vere, esperanto eble ne estas tre konata en Svislando kiel la propraj naciaj lingvoj. En ĉiuj mondregionoj, kiel esprimlingvo ĝi eble povas helpi al pli bona interkompreno. Sed mi opinias ke lingvo, kiu ekzistas jam ekde tiom longe, povus tamen ankoraŭ disvolviĝi pli, por integriĝi en koncepto de monda interkompreno.

- Sinjoro Walter Fankhauser poste daŭrigas dirante :

La principojn de la programoj de Svisa Radio Internacia eble vi bone konas. Ni informadas, ni provas informi ĉiujn, kiuj interesiĝas pri Svislando kaj pri la mondo, pri la opinioj svisaj, pli bone koni nian landon. Kaj esperanto ankaŭ en tiu ĉi konceptaro de nia programpolitiko devus kontribui al la informado de tiuj, kiuj ne povas atingi, aŭ kiujn ni ne povas atingi sen tiu ĉi lingvo. Aŭ tiujn, kiuj ankaŭ interesiĝas al tiu ĉi lingvo kiel aspekto de interhoma ligo. La informado ĉiam malfacilas. La interhoma komunikado ĉiam pli malfacilas. Hodiaŭ ĝi iĝis pli malfacila ol ĉiam ajn. Kaj mi kredas, ke vi, kiuj lernis esperanton, kiuj kontribuis tiel al la diskonigo de esperanto en Svislando aŭ aliloke en la mondo, vi eble serĉis rimedon valoran por interhoma komunikado.

- S-ro Walter Fankhauser poste esprimis siajn bondezirojn al la sukceso de la forumo pri la ekspozicio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando'. Ni aŭdigas ankoraŭfoje lian voĉon, en parto, kie vi klare aŭdos hundon boji. Estas la hundo de s-ro Pelanda, kiu jam ekde multaj jaroj prizorgadas la dissendadon kaj kopiadon do, de niaj radioprelegoj pere de la blindula songazeto.

WF.- *L'information est toujours difficile. On le sait, la communication interhumaine elle est aussi toujours difficile, toujours plus difficile aujourd'hui. Et je crois, vous, que vous avez appris l'espéranto, vous avez contribué à diffuser l'espéranto, soit ici en Suisse qu'ailleurs dans le monde. Vous avez peut-être cherché un moyen valable pour une communication interhumaine peut-être plus facile de ce qu'elle peut être dans les langues courantes.*

Cl.- S-ro Walter Fankhauser konkludis siajn salutvortojn transdonante la bonvenajn vortojn de la direktoro, s-ro Kürcher. En tiu ĉi forumo esprimiĝis interesaj vidpunktoj pri la ekspozicio mem, 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando', kaj pri interlingvistiko en Svislando. La venontajn semajnojn ni aŭdigos ilin al vi. Vi tiel povos ĉeesti tiujn ĉi demandojn de vizitintoj de la ekspozicio kaj tiujn ĉi interesajn respondojn de la fakuloj.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!